

## Babiladaj rondoj

... okazos je la 19-a, vendrede  
**la 22-an de februaro**  
ĉe Knud kaj M-Antoinette  
SUNIER en Montreux  
021 961 38 56 \* 079 210 97 75



**la 15-an de marto**  
ĉe Viktor kaj Charlotte  
BLANC-Maillard en Vevey  
021 922 34 74 \* 079 393 32 63



**la 22-an de marto**  
ĉe Francisko  
RANDIN en Lausanne  
021 647 29 17 \* 076 411 14 55


Vidu kaj aliĝu ĉe  
<http://doodle.com/teum7w3gz46vdyc6>

## Enigmo

Pli bona ol Dio.  
Pli malbona ol Satano.  
La malriĉuloj havas tion.  
La riĉuloj bezonas tion.  
Se ni manĝas tion ... ni mortos.

**Kio estas ???**

Sendu respondon al [kma.sunier@bluewin.ch](mailto:kma.sunier@bluewin.ch)



**Nia akordeonisto ĉe Kristiana**  
*Babilada rondo - 11.01.13*

## **Laŭzana Esperanto - Societo**

Poŝtfako - Case postale 246 \* CH - 1000 LAUSANNE 22  
+41 (0)76 411 14 55 \* +41 (0)21 647 29 28  
[esperanto@citycable.ch](mailto:esperanto@citycable.ch) \* [www.esperanto.ch/Lausanne](http://www.esperanto.ch/Lausanne)  
Poŝtĉekkonto - CCP 10-26785-8

Prez.: David Bühlmann \* 021 624 36 38 - Vicprez.: Charlotte  
Blanc Maillard \* 079 393 32 63 - Sekr.: François Randin \*  
076 411 14 55 - Kasisto: Françoise Petermann \* 079 517 44 43 -  
Redaktoro de la informilo: Knud Sunier \* 021 961 38 56

## **Informilo**

marto 2013 - n° 3

Al nia venonta kunsido, venu kun viaj demandoj ...  
... ni plibonigos niajn sciojn pri  
esperantaj gramatikaĵoj ... kun ☺  
**lunde, la 4-an de marto 2013,**  
je la 20-a, ĉe la unua etaĝo  
de la laŭzana stacidoma bufedo

**Lunde la 1-an de aprilo**  
*(Ne estas aprila fiŝo !!!)*  
**Decidota**

**Lunde la 6-an de majo**  
**Decidota**

**Sabate la 15-an de junio**  
*Jara ekskurso. (ankoraŭ surprizo...)*

*... somera paŭzo ...*

**Lunde la 1-an de septembro**  
**Decidota**

**Laŭzana Esperanto - Societo**

## INSTRUISTO DUNGĜŬO RENKONTAS LUPON

(15-a teksto el *Vere aŭ Fantazie* de Claude Piron)

La okazaĵoj, kiujn mi rakontos al vi hodiaŭ disvolviĝis antaŭ multaj jarcentoj, en tempo, kiam la lando, kiun oni nun nomas Ĉinio, konsistis el pluraj ŝtatoj, kiuj militis inter si.

Ekster la muroj de la ĉefurbo de unu el tiuj — Pu-lando — staris fama lernejo, kies instruisto estis la ne malpli fama Dungĝŭo. Junuloj, kiuj deziris fariĝi oficistoj, komercistoj, ŝtat-funkciuloj, venis el la tuta lando por lerni ĉe li.

Instruisto Dungĝŭo estis ege bonkora homo, kaj lia instruado ne estis nur konkreta kaj praktika. Ĝi krome celis komprenigi al la lernantoj, kial valoras la penon agi bone kaj provi vivi kiel "vera homo", kiel oni tiutempe diris en Ĉinio.

Foje, instruisto Dungĝŭo ekfaris longan vojaĝon. Li piede iris, unue en la kamparo, kaj tuj poste en la senhomejo. En tiu regiono, forlasinte la urbon, oni unue pasis tra vilaĝoj kaj kampoj, sed ne necesis iri tre longe antaŭ ol atingi landoparton, kie neniu homo vivis. S-ro Dungĝŭo paŝis trankvile apud sia azeno, sur kiu troviĝis sako plena je libroj.

La tago estis bela, agrable malvarmeta, kaj s-ro Dungĝŭo tre ĝuis tiun piedan vojaĝon. Kvankam en la senhomejo vivis lupoj kaj aliaj danĝeraj bestoj, li ne timis. Iel li opiniis, ke, ĉar li ŝatas ĉiujn bestojn kaj ĉiam malkonsentis mortigi eĉ plej malgrandan, la bestoj tion sentos kaj ne endanĝerigos lin.

Kaj jen subite alkuris lupo. Tuj estis klare, ke la lupo tute ne deziras ataki instruiston Dungĝŭon. Kontraŭe. Ĝi montris sin malforta kaj petema. La vojaĝanto tuj sentis, ke tiu bezonas helpon, kaj li pretis helpi ĝin.

"Sinjoro, rapide, rapide, savu min," la lupo diris. "Mi sentas, ke vi estas bonkora homo. Nur vi povas helpi min ne perdi la vivon."

"Kio okazas? Kio estas tiu bruoj?" demandis la instruisto. Oni aŭdis malproksiman bruon, malfortan, ne vere tre aŭdeblan, sed sufiĉan por iel elvoki danĝeron.

"Tio estas ĉevaloj. Oni postkuras min surĉevale."

"Oni, ĉu? Kiu?"

"Soldatoj. Estas granda grupo da soldatoj. Ili aperas tre koleraj. Anstataŭ ataki la homajn malamikojn, ili volas mortigi nin lupojn. Sed vi estas tro parolema. En momento de danĝero, oni agu, ne parolu. Se vi bonvolos permesi, ke mi kaŝu min..."

"Tamen lasu min pripensi, kie mi povus kaŝi vin."

"Ni ne havas la tempon pripensi. Ĉu vi ne aŭdas la bruon de la ĉevaloj, kiel ili proksimiĝas? Rapidu. En la sakon mi iru. Sur via azeno ili ne serĉos min."

S-ro Dungĝŭo forprenis el la sako la librojn, provis meti la lupon en ĝin, sed estis neeble, la besto estis tro granda.

"Ne eblas," li diris.

"Jes, eblos," la lupo rebatis, kaj ĝi streĉis antaŭen la kvar piedojn. "Ligu miajn piedojn per ŝnuro, tiel mi facile eniĝos."

Tion faris instruisto Dungĝŭo. Li ligis la krurojn de la lupo, bone streĉis la ŝnuron, kaj metis la beston en la sakon. Poste, por pli bone kaŝi ĝin, li almetis sur ĝin kelkajn librojn.

Tiumomente alvenis surĉevale soldatoj.

"Ĉu vi ne vidis lupon?" la estro demandis.

"Ne."

"Mi ne komprenas. Ĝi venis ĉi tien."

(Daŭrigo en la informilo de aprilo...)